

La letero de l' Akademio de Esperanto

N-ro 15 - Aprilo-Majo-Junio 1991

ISSN 0986-1181



1992 estos elekto-jaro en la Akademio de Esperanto: interalie, diversaj Kandidatoj kaj Membroj de la Eliranta Triono respektive elektigos aŭ reelektigos.

La Sekretario frue en la unua trimonato de 1992 sendos al ĉiuj siaj Kolegoj la informojn alvenintajn pri la novaj Kandidatoj kune kun informoj pri la Kolegoj de la Eliranta Triono, kiuj ne estos rifuzintaj sian prezentadon al la reelekto. La Prezidanto organizos la balotadon.

La informojn, ĉefe pri la kariero profesia kaj esperantista, la Sekretario atendas ĝis la limdato de la 31-a de Decembro 1991, ili fakte estos respondoj al preciza demandaro dissendita ekde la 1-a de Oktobro al ĉiuj personoj, kiuj montris sin pretaj kunlabori kun la Zamenhofa Instituto - ankaŭ poste en la lasta trimonato de 1991 al malfruigintoj.

Persono, kiu opinias sin valora kandidato, povas tion deklari al la Sekretario, S-ro Jean Thierry, redaktoro de la "Letero de l' Akademio". Li tiam ricevos specialan informilon pri la precizaj paŝoj farendaj por fariĝi kandidato. Duvorte: laŭstatute trovi kvin apogantajn Akademianojn kaj skribe deklari agnoskon de la FUNDAMENTO kaj de la jam faritaj decidoj de la Akademio. Se li laŭregule respondas, lia kandidateco estos submetita en la unua trimonato 1992 al la Pleno de la Akademio kune kun ĉiuj aliaj kandidatecoj.

Ankaŭ alia persono aŭ institucio (tute aparte landa Esperanto-Instituto, sed eventuale ĉia asocio) povas proponi eminentan esperantiston. La Sekretario sendos la informilon al la koncernito. Okazas, ke la kandidateco de persono estas proponita de Akademiano aŭ alia. La Akademiano skribas pri tio al la Sekretario: tiu sendas informilon al la koncernito. Tiu respondas aŭ ne! Agas aŭ ne! Alternative la Akademiano povas instigi tiun personon sin prezenti al la Sekretario.

Maloŭte okazis, ke Akademiano, kiu volas eviti al eminentulo mem plenumi parton de la aluditaj laŭstatutaj paŝoj, iniciatis kandidatigi lin: li skribas al pluraj Kolegoj kaj ricevas la kvin laŭstatutajn apogojn, kiujn li transdonas aŭ al la Sekretario aŭ al la koncernito. Sed tio maloŭtege okazas, ĉar povas esti, ke la persono tiam rifuzas la proponitan kandidatecon. Praktike necesas por fariĝi kandidato, ke la koncernito almenaŭ minimume agu. Per tio li esence montras, ke li konas kelkajn Akademianojn, kiuj estas pretaj defendi lian kandidatecon kiel validan.

Sed ĉiuokaze la opinion de la Akademio ĉiu konos post la balotado. Kiel iu povas do ekscii, ĉu li mem aŭ alia apartenas al la kategorio de personoj, kies kunlaboron la Akademio ŝatas profiti? Fakte la 10-a artikolo de la Statuto de la Akademio tion klare kaj eksplicite dissciigas. Kaj ĉiu povas ricevi ekzempleron de la Statuto.*

D-ro André ALBAULT

* Por ricevi ekz-eron de la Statuto sufiĉas sendi peton al la Sekretario kaj aldoni 2 internaciajn respondkuponojn.

« PROMENADO INTER LA NUMERALOJ »

Noto de la Redakcio.- La artikolo de nia Kolego LI SHIJUN aperinta en la ĵusa numero 14-a vekis grandan interesiĝon. Bedaŭrinde enŝoviĝis tajperaro: la citaĵo de la Plena Analiza Gramatiko (§84, RIM. II) ne estas ĝusta: P.A.G. ja rekomendas uzi "kioman horon vi havas?" Oni bonvole korektu ĉi tiun misan tajperaron. El inter la ricevitaĵoj reagoj jen ĉi-sube rimarkinda artikolo, kiun ni esceptokaze aperigas pro ĝenerala intereso.

PRI NUMERALOJ

Kvankam mi ne estas akademiano, ĉu tamen mi rajtas partopreni en debato, kiu rilatas al matematiko, kiu estas pli malpli mia fako? La unua demando estas: kio estas numeraloj? kial ili estas dekdu? La akademiano diras, ke ili estas aŭ substantivoj aŭ adjektivoj aŭ pronomoj. Kiam mi estis infano, oni instruis al mi, en la franca lingvo, ke ili estis adjektivoj, kaj mi miris, ĉar tiuj tiel nomataj adjektivoj ne varias laŭ la genro (francalingve) kaj laŭ la nombro. En Esperanto, kial ili ne ricevis la finaĵon "a"? Por komprenigi tion, ni komencos per anekdoto. Se en iu salono estas homoj kaj seĝoj, oni povas peti, ke la homoj eksidu sur po unu seĝon. Kio povas okazi: 1) ĉiuj homoj sidis sed restas seĝoj; 2) ĉiuj seĝoj estas okupitaj kaj restas homoj starantaj; 3) ĉiuj homoj sidas kaj ĉiuj seĝoj estas okupitaj. En tiu lasta okazo, oni diras, ke la aro de la seĝoj kaj la aro de la homoj havas saman kardinalon*. Tia komparo de la aroj estas tute ĝenerala kaj valoras por ĉiuj aroj. En la speciala kazo de la finiaj aroj, la kardinalo estas nomata "natura nombro". Sed ne ĉiu nombro havas propran nomon. Danke al la dekaria** (arkaisme dekuma) sistemo, oni esprimas la nomojn de la naturaj nombroj per nur kelkaj nomoj. Unue, oni devas nomi la dek unuajn nombrojn de "0 ĝis 9", tio estas dek nomoj, kiuj entenas la nomojn "nul, unu, du...naŭ". Poste, necesas nomi nur la novajn arojn, kiujn oni skribas per novaj ciferoj, tio estas :dek, cent, mil. Laŭ la tradicio de la naciaj lingvoj, oni ne nur arigas la nombrojn dekope, sed oni poste arigas ilin milope, tial ke post mil venas mil unu, mil du... Ĉiam laŭ la modelo de la naciaj lingvoj, Esperanto forlasis la sistemon de la numeraloj (kiuj estas vere nomoj de nombroj kaj ne adjektivoj) post la nombro "mil" kaj poste uzis "miliono"... Antaŭ ol daŭrigi mian esploron, mi deziras precizigi mian aserton pri la natura valoro de la numeraloj. En la esprimo: "sur la monto estas kvar grandaj arboj", oni konstatas, ke "granda" estas plurale notita, ĉar fakte, ĉiu arbo estas granda, do la kvalito aplikigas al pluraj aĵoj. Kontraŭe, la vorto kvar tute ne rilatas al ĉiu arbo, nur unu aĵo estas "kvar" estas la ununura aro de arboj. La numeralo montras la "propran nomon" de la kardinalo de la aro. La aliaj frazoj cititaj de la akademiano estas nur elipsaĵoj. "Du kaj tri faras kvin" estas tute konvencia *** maniero esprimi la realon, tio estas: "Kiam oni kunmetas du arojn, kiuj ne havas komunan parton kaj, kies kardinaloj estas respektive "du" kaj "tri" tiam la kardinalo de la unuiĝo estas "kvin". Kaj en la tria ekzemplo, evidentas, ke la plena signifo estas: "El miaj krajonoj, unu (krajono) estas ruĝas kaj du (krajonoj) estas "bluaj". La frazo tute similas al: "El la vunditoj, multaj mortis" kie "multa" konservas la finaĵon de adjektivo kaj neniu parolas pri pronomo.

Sed ni revenu al la nomo de la naturaj nombroj, kies nombro estas nefinia. Apud la numeraloj, kiuj estas nomoj de kardinaloj, ekzistas en la naciaj lingvoj same kiel en Esperanto, la vortoj: trio, deko, dek-duo... Tiam evidentas, ke temas pri substantivoj, kiuj ne plu montras la kardinalon de la aro, sed la aron mem. Tial tiuj veraj substantivoj akceptas la pluralon, kaj la akuzativon. Kaj krome, tiuj substantivoj, kiuj montras aron, estas veraj mezuriloj por la kvantoj, same kiel estas "litro", "kilogramo", kaj tio pravigas la

.../...

uzon de la prepozicio "da". Se oni diras "litro da lakto", kial oni ne dirus "deko da ovoj"**** kaj "milo da stikantoj"?

La vera problemo estas, ke la ĝisnuna sistemo en Esperanto ne estas kohera. Por la nombroj ĝis "mil" ekzistas kaj "numeraloj", kiu montras kardinalon, kaj "substantivo" kiu montras la aron mem. Sed poste, oni imitis la naciajn lingvojn kaj en Esperanto, oni uzis nur la substantivojn, kaj malaperis la respondaj "numeraloj" (tiuj nomoj de la kardinaloj). Krome, okazis konflikto inter du sistemoj(PIV). Nun la matematikistoj (O.Reiersol) proponis la uzon de la sistemo de Belinfante: duiliono = dek je la 12^a potenco, triiliono = dek je la 18^a potenco. Oni tiam vidas, ke la dekaria sistemo, fariĝas poste "iliono", kie uniliono estas la tradicia "miliono". Solvinte la problemon de la du nacilingvaj kutimoj, restas la manko de numeraloj responde al tiuj substantivoj.

Pri tio, la matematikistoj ne multe okupiĝis, ĉar en la praktiko, la nombroj ne estas sufiĉe precizaj por esti esprimataj per pli ol ses ciferoj. Ekzemple, la nombro de Avogadro (nombro de molekuloj en unu molo)***** estas skribita: $N = (6,02295 \pm 0,00016) \times 10^{23}$. La nombro de kulomboj en unu elektrono estas: $e = (1,60206 \pm 0,00003) \times 10^{-19}$. Tute ne tams pri milionoj, miliardoj ktp.

Sed tamen, se oni deziras tute raciigi la sistemon, oni devas trovi nomojn por la numeraloj, kiuj montras la kardinalojn de la aroj, kies nomoj estas "miliono, miliardo, duiliono, triiliono...noiliono". Estas du solvoj: tiu proponita de la Akademiano, kiu konservus la rilaton inter la numeralo kaj la substantivo (miliard => miliardo), sed ĉu milionaŭ miljon? La alia solvo estas uzi la internaciajn prefiksojn de la unuoj, kiuj estas "mega" por la sesa potenco de dek, "giga" por la naŭa potenco de dek kaj "tera" por la dek-dua potenco de dek. Mi persone opinias, ke la unua propono estas la plej bona.

Tio solvas la unuan problemon prezentitan de la akademiano. Ekzemple: "Nun en la urbo vivas milion unu loĝantoj." La nombro, kiun oni skribas 6 235 417 oni nomas ses milion ducent tridek kvinmil kvarcent dek sep. Kaj kompreneble post numeralo oni neniam uzas la prepozicion "da".

Sed estas aliaj problemoj debatitaj en la artikolo de "La Letero de l'Akademio". Pri la malplena aro, la natura nombro (nomata "zéro" en la franca lingvo) devas esti "nul" dum la nomo de la aro estas "nulo". La adjektiva formo "nula" montras la kvaliton de la malplena aro, kaj pli malpli samsignifas, kiel "sen". "La valoro de tiu objekto estas nula" = "la objekto estas senvalora". "Nula" ne povas havi vican valoron, ĉar "nul" estas la deiro de la vico kies unua ŝtupo estas precize la "unua". La aparteco de "nul" ne ĝenas la matematikistojn, ĉar ili jam kutimiĝis al la specialaj karakteroj de tiu stranga nombro kiu samtempe estas pozitiva kaj negativa, kiu nuligas ĉiujn produktojn, kie ĝi estas ktp. Pri la problemo de "miliarda" ĉu vicmontra, ĉu nombra, ĝi ne apartiĝas de la problemo pri "deka", kiu parencas kun "dek" kaj "deko". Por mi, la centa paĝo estas tiu, kiu postsekvas la naŭdek-naŭan kaj antaŭas la cent-unuan. Kial ne estus same por la miliarda?

Tute alia afero estas tiu de la vortoj: "kelka" kaj "multa", kiuj estas adjektivoj, kaj montras iun nedefinitan kvanton. Ĉar ili montras kvanton, ili similas al la unuoj de la metra sistemo, kiel estas: metro, litro, kilogramo, kaj oni devas uzi ilin same kiel tiuj aliaj mezuriloj, tio estas kun la prepozicio "da". Neniam iu proponis uzi la esprimon "mi aĉetis litr' lakton", do kial proponi: "mi aĉetis kelk' librojn" anstataŭ: "mi aĉetis kelkajn librojn".

Pri la uzo de "da", mi legis (en PIV) ion tre simplan kaj praktikan. Kiam oni diras "bukedo de rozoj", kio gravas estas la bukedo, se oni diras "bukedo da rozoj", kio gravas estas la rozoj (la bukedo estas nur la mezurilo). En la frazo : " multe da homoj ŝatas uzi ĝin" la subjekto estas "homoj", ĉar la cititan frazon oni povas esprimi per:" multaj homoj ŝatas uzi ĝin". Tute samas pri la akvo, kio gravas estas la akvo nur poste venas la kvanto. La sama problemo prezentiĝas, kiam oni diras "deko da soldatoj mortis en tiu batalo", la subjekto estas "soldatoj" kaj la esprimo "deko da" estas nur kvanta suplemento de "soldatoj". Mi vidas en la propono de la akademiano iun riskon konfuzi la numeralojn, kiuj montras precizan kardinalon, kun la adjektivoj "kelka" kaj "multa", kiuj montras tute neprecizajn kvantojn. Cetere la adjektivoj ofte akompanas substantivojn kaj malprecizigas ilin. Ekzemple: " Kelkaj centoj da homoj manifestaciis surstrate". Al la demando: " Mi vendis tri centojn da biletoj por la spektaklo" la nombro de la biletoj ne estas preciza, ĝi nur proksimumas la nombron 300, sed la nombro de la centoj estas preciza: "tri".

Konklude, la nura malregulaĵo, kiu ekzistas en la nuna uzo de la lingvo, estas la manko de numeraloj kiuj respondus al la substantivoj "miliono" = 10^6 , "miliardo" = 10^9 , "duiliono" (arkaisme biliono) = 10^{12} ktp. En la praktika vivo, pro la nesufiĉa precizeco de la mezuroj, tiu problemo ne tre gravas. Sed, se oni deziras tute raciigi la lingvon, oni povas uzi novajn vortojn, kiel estas "milion" (aŭ milion), "miliard", "duilion"...

Fernand BOYET

RIMARKOJ DE LA REDAKCIO.-

* "kardinalo" - en la senco de fundamenta nombro.

** "dekaria" - se Esperanto posedus ian sufikson -esma (unuesma, duesma...), tiam deka havus la signifon de dekuma (rilata al 10)! Ja dekaria havas la malavantaĝon enkonduki ne oportunan sufikson -aria! Kaj -nara (pro:"binaire","ternaire",ktp...) estus ja pli bona: bi-nara, tri-nara... dek-nara.

*** "Du kaj tri faras kvin".- ja "tute konvencia", sed "Fundamenta (§12) kaj kutima estas ankaŭ: " Du kaj tri estas kvin".

**** "deko da ovoĵ" - kial oni ne dirus? Sed oni ja tion diras!

***** "molo" - grammolekulo.

Iom malfacila artikolo por nefakuloj, sed tiu ĉi bonvolu konsideri la intereson de la temo!

LOKAJ, REGIONAJ, NACIAJ KAJ INTERNACIAJ ESPERANTO-ORGANIZAJĴOJ ABONU
KAJ DISKONIGU "LA LETERON DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO". TIEL VI HELPAS
LA AKADEMION DE ESPERANTO DEFENDI KAJ EVOLUIGI LA INTERNACIAN LINGVON
DE D-RO L.L. ZAMENHOF.

DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ

" Ne gravas, se foje vi ne konsentas...

La vivo estas tia, ke ĉio progresas nur el kontraŭstarigo de ideoj!

La sola problemo estas konscii pri tia neceso...

Kaj ne transformi kontraŭstaron de ideoj en kontraŭstaron de homoj!".

D.-Ĉu vere la sufikso -iĝ- ne transitivigas transitivajn verbojn?

En Plena Ilustrita Vortaro sur la paĝo 413 oni legas:

" Kun transitivaj verboj iĝ subkomprenigas ĉiam antaŭ si la partikipan sufikson -ata (aŭ-ita); alivorte ĝi servas por netransitivigi transitivajn verbojn... Ekz.: Kio vendiĝas kaŝite, vendiĝas plej profite"..."

Tio ne estas akceptebla; jen la demonstro... La transitivaj verboj signifas agon, kiu transiras de iu ento nomata agento al alia ento nomata paciento kaj pli specife, la reprezentanto de la agento en la frazo estas la subjekto kaj tiu de la paciento estas la objekto.

Aliflanke, netransitiva verbo estas tiu, kiu reprezentas agon, kiu ne transiras eksteren, t.e. la agon faras la ento reprezentata per la subjekto sen influo sur alian enton.

Laŭ tio dirita supre, por ke iu verbo estu netransitiva, ĝi devas plenumi la jenajn kondiĉojn: 1) signifi agon; 2) tiun agon devas realigi la subjekto; 3) la ago ne kaŭzas efikon ekster la subjekto-agento. Se mankas unu el la tri kondiĉoj, nepre la verbo ne estas netransitiva. En la ekzemplo "Kio vendiĝas kaŝite..." la subjekto estas "Kio", la agento estas la vendanto, kiu, kvankam ne menciata en la ekzemplo, nepre ekzistas. Do, la agento ne estas la subjekto, t.e. la kondiĉo 2 ne plenumiĝas. Sekve la verbo ne estas netransitiva. Alivorte, ĉi-ekzemple, la sufikso -iĝ- ne transformis la transitivan verbon "vendi" en netransitivan. Same por aliaj aplikoj al tiaj verboj..."

(Inĝ. Félix García Blázquez)

R.- Tipe matematika rezonado! Oni aksiome fiksas plurajn kondiĉojn pri ia logika efikeco; kaj poste sufiĉas nei la ekziston de unu el ili por eldiri konklude, ke la konsekvenco estas nea.

Nu, en la analizita ekzemplo: "Kio vendiĝas kaŝite, vendiĝas plej profite", ekzemplo eltirita el la plumo de D-ro L.L.Zamenhof, la rezona eraro estas deklari, ke "la agento estas la vendanto, kiu, kvankam ne menciata en la ekzemplo, nepre ekzistas..."

Ja la lingva logiko ne estas rigore matematikeca, ĝi rezultas pli ĝuste el psikologia koncepto kaj reprezentado de la mondo; kaj la homa konscio konsentas prezenti agon, kvazaŭ sen ekstera aganto, kvazaŭ la subjekto agas per si mem pro fataleco aŭ personecigo, eĉ se en la realo ĝi estas inerta kiel en ekzemploj: "Kio vendiĝas kaŝite..." aŭ en "La libro legiĝas facile". Tiam la konscio akceptas, ke io agas kaj samtempe suferas la efikon de la ago, kvazaŭ ĝi mem iniciatus la agon kaj spertus ĝian sekvon. Tion oni kutime nomas la mediala voĉo inter la aktiva kaj la pasiva. P.I.V. ĝin difinas jene Verba voĉo, kiu prezentas la agon kiel koncernantan nur la agantan subjekton ekskluzive de alia objekto, aŭ rigardatan de la interno de la subjekto: la formoj "sidiĝi, okupiĝi" estas veraj medialoj".

Kaj la Plena Analiza Gramatiko klare prezentas tian koncepton: "La diferenco inter la pasiva kaj mediala voĉoj estas, ke la pasivo, kvankam ĝi tiras la atenton pli al la ago ol al la aganto, tamen subkomprenigas aganton, esprimitan aŭ ne per agant-adjekto: "la ŝtono estas rulata (de iu)"; male, ĉe la mediala voĉo la gramatika subjekto kaj la aganto estas identaj, do kroma aganto ne estas subkomprenata: "la ŝtono ruliĝas(per si mem)".

oni ne matematike rezonu pri ĉiuj psikologiaj konceptoj de la homa menso!

.../..

D-Pri uzo de la kondicionala preterito.

"La slavaj verkistoj (Zamenhof, Kabe, Grabowski, ktp) ofte uzis kondicionalon simplan anstataŭ perfektan. Ekzemple:

* "Estus pli bone, se mia patrino min ne naskus." z

* "Vi donis al li tutan fiŝon... La fiŝon ni devus manĝi." K;

* G.Badash en sia traduko "Tri homoj en boato" skribis: "Se ni ne estus antaŭe avertitaj pri la germana maniero de komika kantado, ni ja farigus timemaj"...

Oni tuj komprenas, ke, ĉar ili estas avertitaj, ili ne farigis timemaj.

Sed la Plena Analiza Gramatiko ne aprobas tian uzon de la kondicionalo pro eblaj konfuzoj pri la tempo kaj opinias do necesa la uzon de la participo, tolerante la simplan formon nur en subpropozicioj: "Se vi venus, vi estus renkontinta mian fraton."

Ĉu la malapero de la nocio rezulta aŭ daŭra tiam ne ŝajnas ĝena? Kiel kompreni jenan frazon? "Se mi estus vizitinta lin hieraŭ je la oka, eble li estus tiam skribinta leteron al J." Kiu povas scii, ĉu temas pri skribita aŭ skribata letero? La "slava" maniero ne estigas dubon en tia okazo. Kial do ne indiki la tempon per adverbo aŭ subpropozicio, kiam la kunteksto ne sufiĉas? "Se antaŭe mi estus amata..." - "Se, antaŭ ol mi renkontis ŝin, alia virino min amus..." - "Jam antaŭe vi povus diri tion. Se mi eksciis tion pli frue, mi tiam rezignus." - "Mi intencis viziti lin je la sepa vespere. Se li estus tiam ankoraŭ laboranta, mi ne restus ĉe li; male, se li estus fininta, ni agrable babilus".

(D.C. Ecquevilley).

R.- La demando, kiun vi levas, estas ja interesa el stila vidpunkto. Efektive, d-ro L.L.Zamenhof kaj la slavaj verkistoj ne sentis la bezonon precizigi la kondicionalan preteriton per ia sistema uzo de la participo - almenaŭ ĉe la aktivo. Kio montras plian pruvon, ke la participoj en Esperanto esprimas antaŭ ĉio, ĉu la efektivigo de la ago estas -ita, nur -ata aŭ simple -ota (anoncita), kaj nur akcesore ili esprimas relativan tempon, kiam tiu ĉi koincidas kun la grado de fariteco. Oni tro ofte neglektas, ke D-ro L.L.Zamenhof uzis ĝuste adverbojn por tempo precizeco: - antaŭe - jaŭm - tuj - nun...

"Se mi vizitus lin hieraŭ je la oka, eble jam li skribus leteron al J." Cetere, se nepre necesas precizigi la efektivigon aŭ ne de la letero, sufiĉas ŝanĝi la frazon: "Se mi vizitus lin hieraŭ je la oka eble jam lia letero al J. estus skrib(ita aŭ ata)." Eĉ pro la ideo skribi, eblas diri ankaŭ: "...eble jam li estus skrib(anta aŭ inta) leteron al J."

Ja per adverboj aŭ subpropozicioj oni povas nuanci la tempon kaj konservi la participojn pri la ago-stato, se necesas.

D-Pri la nocio de "lingvo-novelo".

"Mi jam aŭdis pri tiu termino en la franca lingvo, kaj tio ne tre plaĉas al mi, ĉar, kiam oni diras la vorton "nivelo", oni subkomprenas, ke estas "altaj" kaj "malaltaj" niveloj. Kompreneble, kiam homo uzas la vorton "lanta", dum mi uzas "malrapida", la uzanto de "lanta" opinias, ke li sin trovas je pli alta nivelo, alidirite lia lingvo-uzo superas la mian. Tiam hierarkion mi ne tre ŝatas. Laŭ mi la taŭgeco de termino kuŝas en la ebleco pli bone klarigi iun situacion. Ekzemple per la teorio de la aroj oni pli facile komprenigas la funkcion de la numeraloj ol per la teorio de la adjektivoj.

(F.B. Angers)

D.- Rilate la demandon ĉu nomiĝi aŭ nomiti, levitan en "La Letero de l'Akademio" n-ro 14, konvenas ekspliki pli detale kaj surbaze de PIV.

"II. Kun VERBA radiko iĝ signifas:" vole aŭ nevole transiri al nova stato esprimata de la radiko, kaj rezultanta de ago farita de iu ajn, inkluzive de la subjekto":

A) Kun netransitivaj verboj iĝ subkomprenigas antaŭ si la partecipantan sufikson -anta (aŭ -inta)."

La de PIV cititaj ekzemplaj frazoj kun la transitivaj verboj morti, pendii, plene subtenas tiun aserton. Tiel ankaŭ la uzo de sidiĝi facile eksplikeblas: alpreni sidantan staton, ĉar la verbo sidi ja estas netransitiva.

Jene PIV daŭrigas:

B) Kun transitivaj verboj iĝ subkomprenigas ĉiam antaŭ si la partecipantan sufikson -ata (aŭ -ita); alivorte ĝi servas por netransitivigi transitivajn verbojn."

La de PIV cititaj ekzemplaj frazoj kun la transitivaj verboj montri, premi, detrui, taksi, vendi, fari, meti, semi, kovri, eksciti, kolekti plene subtenas tiun aserton.

PIV daŭrigas:

"Rim. 1 kiel oni ĵus vidis, la iĝ-verboj estas iafoje uzataj kun la senco de pasiva verbo. Kvankam la ideoj, esprimataj de tiuj du formoj estas proksimaj, ekzistas tamen diferenco: la pasiva formo subkomprenigas aganton esprimitan aŭ ne per agant-adjekto: "la pordo estas fermata (de ies mano)"; sed ĉe la iĝ-verboj la subjekto kaj la aganto estas identaj, do kroma aganto ne estas subkomprenata: "la pordo fermiĝas (per si mem)".

Laŭ tiu ekspliko eĉ ne konvenas uzi la formon nomiĝi, ĉar ĝenerale la subjekto kaj la aganto ne estas identaj: iu(j) baptas/donas nomon al iu(j) alia(j). Ni vidu do, kion PIV diras sub nomi:

"(tr)1 Signi ion aŭ iun per distinga, kutime uzata vorto... " La arbo, sur kiu kreskas pomoj, estas nomata pomujo "z; "patro kaj patrino kune estas nomataj gepatroj "z; la tiel nomata progreso ofte estas nur... 2 Signi iun aŭ ion per lia distinga, kutima nomo: urbo, nomata Cidon; Nerono, tiel nomata Ahenobarbus. 3. Signi iun aŭ ion per distinga, kvalit-esprima vorto (Ne estas ekzemplo de partecipanta uzo). 4. Unuafoje doni la elektitan nomon: la unua arta satelito estis nomita Sputnik."

Kiel vidite, kiam temas pri unuafoja dono de nomo, t.e. bapto, oni uzas estis nomita (aŭ se vi volas, nomitis), sed por iu aŭ io, kiun/kion oni daŭre nomas, oni uzas estas nomata, (aŭ nomatas). En la maloftaj okazoj, kiam subjekto kaj aganto identas, la plej logika formo ŝajnas: li/ŝi (mem) nomis sin... (L.H.knoedt, Brazilo.-)

Noto de la Redakcio.-

Ĉar en la n-ro 14-a de "LA LETERO" forfalis unu linio de la citaĵo de D-ro L.L.Zamenhof, mi ripetas ĝin: "...Anstataŭ "sidiĝu" estas pli bone diri "sidiĝu vin" aŭ "eksidu": tamen ĉar la formo "sidiĝu" jam de tre longe estas uzata preskaŭ de ĉiuj Esperantistoj, tial ĝi fariĝis jamu "esperantismo" kaj nomi ĝin eraro oni jam ne povas. Ne sole en naturaj lingvoj sed ankaŭ en lingvo artefarita ĉio, kio estas uzata de la pli multo da bonaj verkistoj, devas esti rigardata kiel bona, se ĝi eĉ ne estas absolute logika; ĉar se ni postulos ĉiam nur logikon absolutan, tiam la libera uzado de lingvo artefarita fariĝos tute ne e'bla, ĉar tiam malaperos ĉiu utileco de longa ekzercigado kaj en la deka jaro de uzado de la lingvo, kiel en la unua jaro, ĉiu devus konstante tro longe pripensadi kaj pesadi ĉiun sian vorton." (substreko mia)

(J.T.)

.../...

(DEMANDOJ KAJ RESPONDOJ... fino)

R.- La termino estas ĝenerale uzata de lingvistoj kun nocio ne de "hierarkio" sed de "tavolo", interrilato laŭ iu uzateco; cetere per via komentario pri la numeraloj vi mem montras bonan ekzemplon de faka lingvo-nivelo, nome matematika.

(J.T.)

D.- Ĉu bicikla aŭ biciklanta homo?

" Mi starigis la demandon, kia estus la rolo de la participo en la supra ekzemplo, se ambaŭ formoj estus nur simplaj adjektivoj? Nenian respondon konkretan mi ricevis."

(Dektri-Nia Bulteno n-ro 51)

R.-Ja ambaŭ per sia finaĵo de a-vorto sintakse same rolas kiel adjektivoj (epitetoj, predikativoj). Tamen unu restas ĝenerala kun la signifo :rilata al; povas do esti homo, kiu fabrikas, vendas, riparas, aŭ veturas per aŭ sur biciklo...laŭ la kunteksto. La alia pro la sufikso -ant- precizigas, ke temas pri la ago bicikli, kaj ĉi tiu ago - kiel estas legeble en PIV - "jam komenciĝis kaj ankoraŭ ne finiĝis sed plu daŭras." Alidire la verba formo -ant- aktual-igas agon plenumiĝantan.

(J.T.)

NOTO DE LA REDAKCIO.- Sekve al la publikigo de "LA BONA LINGVO" ŝprucis tra la gazetaro pluraj kritikoj pri la uzo de internaciaj vortoj... Ni memorigas al tiuj kritikantoj la jenan respondon n-ro 55 de D-ro L.L.Zamenhof (Oficiala Gazeto.1911,p.222):

"Kelkaj samideanoj forte malaprobis la uzadon de vortoj kun pseŭdosufiksoj "cio", "toro" k.t.p. (ekz-e:"civilizacio","redaktoro" k.t.p.); ili diras, ke de tiaj vortoj ni devas preni nur la radikan formon (ekz-e:"civiliz", "redakt") kaj ĉiujn devenajn formojn uzi nur kun sufikso aŭ finiĝo pure Esperanta (ekz-e:"civilizo","redaktejo","redaktisto" anstataŭ "civilizacio","redakcio", "redaktoro"). Komprenoble, se tia vorto, kiel ekzemple "redaktejo", estus tute identa kun la vorto "redakcio" kaj povus ĝin perfekte anstataŭi, certe neniu el ni plendus, se la vorto "redakcio" baldaŭ malaperus el nia lingvo; sed se iu diras, ke la formoj pseŭdosufiksaj estas kontraŭ-Esperantaj, aŭ ke ili prezentas malaprobindan enkondukon de novaj vortoj, mi opinias, ke li eraras. Tiaj formoj, kiel ekzemple "redakcio","civilizacio", estas nek kontraŭ-Esperantaj, nek novaj, ĉar laŭ la §15 de nia gramatiko ili plene apartenas al nia lingvo jam de la unua momento de ĝia naskiĝo. Ni povas esperi, ke pli aŭ malpli frue la pseŭdosufiksaj vortoj "fremdaj" fariĝos arĥajismoj* kaj cedos sian lokon al vortoj "pure Esperantaj"; ni povas eĉ konsili tion; sed postuli tion ni ne povas, ĉar la diritaj vortoj ne sole havas en nia lingvo (laŭ la §15)) plenan rajton de ekzistado, sed ankoraŭ dum longa tempo multaj el tiuj pseŭdosufiksaj vortoj estos pli oportunaj, pli naturaj kaj pli kompreneblaj, ol la ilin anstataŭontaj vortoj "pure Esperantaj". Ne venis ankoraŭ la tempo, ke ni estu tro pedantaj..."

*) arkaismoj.

"LA LETERO DE L'AKADEMIO DE ESPERANTO", trimestra informa letero eldonita de "La Amikoj de l'Akademio de Esperanto", 5, rue Léon Cogniet, 75017 PARIS-Francio;- Redaktoro: Jean THIERRY.- Direktoro de la publikaĵo: André BOURDEAUX.- Presejo: COCONNIER. 72300 SABLE. C.P.P.P. n-ro 6971.- 1 n-ro: 40 FRF. Jara abono: 120 FRF. Pagebla ĉe kontoj: banko: Crédit Lyonnais n-ro 7090 F. Poŝtĉekkonto: 735 27 B Paris.- UEA: Poŝta banko Nederlando 37 89 64 (ĝiroficejo Den Haag); precizigi "por la Amikoj de l'Akademio de Esperanto".
Peranto por Svedio: Sveda Esperanta Federacio- c/o Lisbet Andreasson, Södra Rörum pl.455-S 242 94 HORBY-Svedio.
Peranto por Brazilo: Brazila Esperanto Ligo- ScS Ed Jockey Club-Sala 103. 70300 Brasilia DF (caixa Posta 11 11 05-) Brazilo-
Peranto por Kubo: S-ro Orlanda RAOLA Gonzalez (E-redakcio de Radio Havano)- Longa 220, apt 5, Mantilla, 13800 LA HABANA-Cuba/
Peranto por Meksiko: S-ro Enrique LEMUS RODRIGUEZ, Insurgentes Sur.3493 villa Ilimpica edif. 27-001 14020 Tlalpan México DF Meksiko.
Peranto por tuta Azio: S-ro UMEDA Yosimi, I.P.O.B. 5458, Tokyo 100-31 Japanio.